

Alfred Zschiesche,

## Kiam flirtas niaj flagoj

*tradukita de N. N. 99*

Kiam flirtas niaj flagoj  
ni veturas trans la mar',  
por tramigri fremdajn landojn,  
nun adiaŭ amikar'!  
Brilas la suno,  
flugas nubaro  
sonas la kantoj  
super la mar'.

Radiante, brilas suno,  
feliĉigas ĉiam nin,  
sed ni ankaŭ ne malĝojas  
se vualas nuboj ĝin.  
Blovias ventegoj,  
muĝas ondaroj,  
kantas ni kantojn,  
gaje en ĥor'.

Ni pasiaj mondvagantoj  
migras sub la stela mar';  
niajn kantojn ni kantadas,  
ke vekigis dormantar'.  
Kiam la nova  
tag' komenciĝas,  
for ni jam estas  
en fremda land'.

...

Lumen al la montaj pintoj  
logas kelka kruta voj';  
Nur antaŭen! Ne hezitu!  
Ĉiam migru ni kun ĝoj'!  
Super nubaro  
celo nun brilas,  
vasta la rondo,  
neĝa montar'.

*Traduko de la Germana poemo "Wenn die bunten Fahnen wehen" de ALFRED ZSCHIESCHE (\*1909-02-22 – †1992-02-26) en Esperanton de N. N. 99.*

*Arg-1070-2160 (2014-06-29 09:56:15)*

*Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en [http://kantaro.ikso.net/kiam\\_flirtas\\_niaj\\_flagoj](http://kantaro.ikso.net/kiam_flirtas_niaj_flagoj). Vidu ankaŭ:[http://www.de-eo.de/eo/deutsche\\_Volkslieder\\_kaj](http://www.de-eo.de/eo/deutsche_Volkslieder_kaj)  
[http://kantaro.ikso.net/la\\_migrantoj](http://kantaro.ikso.net/la_migrantoj).*